# Korona epidemio atakas virinojn
## la 10an de decembro 2020

Divastiĝo de koronavirusa epidemio donas grandan baton al la japana socio. Hodiaŭ mi skribos pri la batoj al virinoj.

## Multiĝo de virinaj sinmortigoj

Ekde junio sinmortigoj multiĝis kompare kun tiuj en 2019 jene. Precipe virinaj sinmortigoj multiĝis.

| | | 2019 | 2020 |
|---|---|---|---|
| **Julio** | Entute | 1780 | 1851 ( +3.99) |
| | Virino | 557 | 662 (+18.85) |
| **Aŭgusto** | Entute | 1577 | 1910 (+21.11) |
| | Virinoj | 457 | 669 (+46.38) |
| **Septembro** | Entute | 1645 | 1849 (+12.40) |
| | Virinoj | 497 | 648 (+30.38) |
| **Oktobro** | Entute | 1510 | 2158 (+42.91) |
| | Virinoj | 454 | 852 (+87.77) |
| **Novembro** | Entute | 1574 | 1798 (+14.23) |
| | Virinoj | 511 | 629 (+23.09) |
| **Decembro** | Entute | 1472 | |
| | Virinoj | 462 | |

Sume;

En 2019


Entute: 8086 sinmortigoj

Virinoj: 2476 sinmortigoj

En 2020


Entute: 9566 (je 1480, 18.30 % pli multe ol en 2019)

Virinoj: 3460 (je 984, 39.74% pli multe ol en 2019)




Pri la multiĝo de la virinaj sinmortigoj "Subtena Grupo al solaj patrinoj en Osaka" analizas jene:

* Sola patrino estas eksedziniĝinta virino aŭ edzo-perdinta virino, kiu sola subtenas la familion, ĉefe siajn infanojn.




Virinoj malstabile laborantaj kiel partatempaj laboristoj perdis laboron pro la koronavirusa pandemio. Kiam ili ricevis subvencion de la registaro en somero po 100 000 enojn (1000 eŭrojn) al ĉiuj siaj familianoj, ili povis elteni la malfacilon, sed poste la epidemio pli disvastiĝis kaj ekmankis al ili mono por vivteni sin. Ili ne


havas perspektivon por sia vivo kaj tio subpremas ilin. Ni ricevadas urĝegajn kriojn de tiuj solaj patrinoj. Ni deziras, ke la registaro subtenu ilin per rapidaj monhelpoj.

---

En Japanio nun unu triono de la geedzoj estas eksedziĝaj. En 2017 estis 1,232 milionoj da solaj patrinoj, el kiuj 81,8% laboras, kaj ilia averaĝa enspezo jare estis 2,43 milionoj da enoj (24,3 mil eŭroj).

* La jara averaĝa enspezo de la japanoj estas 4,41 milionoj da enoj (44,1 mil eŭroj).

## Ĉu la pandemio efikis por aŭ kontraŭ bebnaskoj?




Jen estas la ŝanĝiĝo de la japana loĝantaro. Nun troviĝas 124 271 318 loĝantoj en Japanio (la 1an de januaro 2020), kaj ni nun staras preskaŭ la pinto de la diagramo, sed poste la loĝantoj pli kaj pli malmultiĝos kaj

en 2100 estos iom pli ol 40 000 000 loĝantoj same kiel en la komencaj jaroj de la japana moderniĝo en 1860-aj jaroj.


Nun ĉie estas maljunuloj. La loĝantaro konsistas el

| | |
|---|---|
| loĝantoj de 0-jara ĝis la 14-jara | 11,9 % |
| loĝantoj de 15-jara ĝis la 64-jara | 59,3 % |
| loĝantoj de 65-jara kaj pli aĝa | 28,8 % |

Tial ĉie estas multege da maljunuloj kaj maloftas gejunuloj.

En tiu situacio multigi naskojn estas tre urĝe, sed tio tute ne sukcesis. Multaj gejunuloj vivas malriĉe kun timo de ebla maldungiĝo. Ili ne povas kaj volas geedziĝi pro malstabila ekonomia situacio. Tial bebnaskoj pli kaj pli malmultiĝas. Kiam mi naskiĝis en 1941, 2,5 milionoj da beboj naskiĝis. Kiam mia filo naskiĝis en 1966, 2 milionoj, sed kiam mia nepo naskiĝis en 2010, unu miliono, kaj en 2019, nur 0,865239 miliono, je 53161 beboj malpli ol en la lasta jaro..

Okaze de la pandemio, la registaro rekomendis, ke ĉiuj restu hejme laŭeble kaj samtempe, ke ĉiuj ne amasiĝu kaj proksimiĝu, por eviti infektiĝon de la viruso. Kiam junaj geedzoj ekloĝis multajn horojn kune hejme, ĉu ili havis pli da okazoj por bebnasko aŭ ĉu ili evitis bebnaskon? Tio estas tre interesa demando por mi. La respondo estas, ke la pandemio efikis kontraŭ bebnaskoj.





Laŭ la statistiko pri gravediĝoj inter majo kaj julio, la nombroj estis pli malgrandaj ol tiuj en la lasta jaro, kiel vi vidas en la supra diagramo.

La plej granda kialo certe estas malklara estonteco. Oni ne scias, kiam tiu pandemio finiĝos. Oni vidas la ekonomian stagnadon. Turismo malaperis. Ne venas eskterlandaj turistoj. Eĉ grandaj flugkompanioj suferas. Restoracioj kaj hoteloj estis fermitaj. Malgrandaj kompanioj sub tiuj grandaj kompanioj pli suferas. Terkulturistoj kaj fiŝistoj perdis siajn klientojn, nome hotelojn kaj restoraciojn. Multaj laboristoj ne povas labori aŭ foje estis maldungitaj. En tiu situacio, oni antaŭvidas,

ke estos pli malfacile vivteni sin en venontaj jaroj, do des pli oni hezitas havi bebojn.

Jam de 30 jaroj la japana ekonomio stagnadas, kio estas la plej granda kialo de malmultiĝo de beboj dum la pasintaj jaroj, kaj la nuna pandemio donis la mortigan baton al Japanio. Mi supozas, ke la diagramo pri la ŝanĝiĝo de la japana loĝantaro fariĝos jene:




Unu el la kialoj de la lastatempa malmultiĝo de gravediĝoj estas en la kutimo de naskontaj edzinoj. Tiuj, kiuj loĝas en grandaj urboj aparte de siaj gepartoj, emas naski bebon en sia hejmurbo sub sia patrino, tamen nun multaj provincaj hospitaloj ne volas akcepti ilin, timante, ke ili kunportos la viruson kune. Krome, nun en decembro multaj hospitaloj estas pretaj akcepti koronavirusajn infektitojn, rifuzante aliajn malsanulojn, tial por gravedaj virinoj la situacio pli malfacilas. En tiu situacio junaj edzinoj certe evitos gravediĝon.

S-ro Taniguĉi Ĵiroo, ginekologo en la urbo Mijazaki en la suda insulo Kjuŝuu, skribis jene en la ĵurnalo Asahi la 14an de novembro 2020:

> En mia kliniko bebnaskoj duoniĝis. Mi neniam spertis tian drastan malmultiĝon antaŭe. Certe multaj timas eblan malmultiĝon de enspezo kaj maltrankviliĝas pro manko de vakcino. Se tiu tendenco daŭros, la bebnaskoj en la venonta jaro estos 60-70% pli malmultaj ol en la lastaj jaroj. Tio estas senprecedenca krizo. La registaro prenu kontraŭrimedojn senprokraste, ekzemple senpagajn vizitojn al ginekologoj kaj bebnaskojn.

Male nemalmultaj lernantinoj nevolante gravediĝis. En printempo lernejoj estis fermitaj, do tage ili devis resti hejme, sed por ili resti hejme kun senamaj gepatroj estis ia torturo. Ili vagas ekstere sencele kaj estis embuskitaj de malbonuloj kaj gravediĝas. Laŭ iu grupo, kiu helpas tiajn junulinojn, ĝi ricevis en junio 7-oble pli multe da telefonoj pri tiu afero ol en la lasta jaro.

Eĉ antaŭ la pandemio, vivo de malriĉaj virinoj estis jam en kriza situacio, kaj tion akcelis la disvastiĝo de la koronaviruso. La viruso ŝajne atakas homojn egale, sed ne. Malriĉaj homoj pli severe suferas pro la viruso. Ili devas plu labori en malbonaj kondiĉoj, tiamante infektiĝon, dume riĉaj homoj povas vojaĝi per la subvencio de la registaro, kiu volas stimuli la ekonomion per turismo.